Taĝ-Mahalo

Taĝ-Mahalo (aŭ Taĵ-Mahalo) estas la nomo de monumento en Agra (Hindio). Ĝi apartenas al la Monda Kulturheredaĵo de UNESKO. Ĝia nomo signifas “krona palaco” aŭ “krono de la palaco”.

Ĝin konstruigis imperiestro *Ŝah Ĝahan* kiel tombon por sia favorata edzino *Arĝumand Bano Begum*, nomata ankaŭ *Mumtaz Maha* (lumo de palaco). Ŝi mortis en 1631, naskante la 14-an idon de la imperiestro. Li ekkonstruigis la monumenton en 1631, laborigante pli ol 20 000 homojn, kiuj finis en 1648.

La tombo estas islama, do ne enhavas bildojn, sed ja moskeon, kiu direktiĝas okcidenten, al Mekko.

Preter la monumento fluas rivero Jamuna, kaj *Ŝah Ĝahan* planis por si mem simetrian monumenton aliborde, el nigra marmoro. Sed antaŭ ebla realigo de la plano lia filo *Muhammad Aŭrangzeb Alamĝir* detronigis lin. *Ŝah Ĝahan* pasigis la reston de sia vivo mallibera kaj en 1666 estis entombigita apud sia edzino.

Pro la daŭra industria evoluo de Barato, la ĉirkaŭa aero iĝis polua, kiu damaĝis la monumenton, flavigante la origine blankajn murojn. Post tio oni permesas la alproksimiĝon de la konstruaĵo nur je distanco de 2 km per aŭtomobilo aŭ aŭtobuso.

Retpaĝo: www.traduki.de
Teksto: eo.wikipedia.org/wiki/Taĝ-Mahalo